**2025.5.5 Finnlando**

Al Finnlando la printempo malrapide venas. En la plej norda parto de Laponio oni ankoraŭ havas pli ol unu metron da neĝo, dum en la sudo, ĉirkaŭ la ĉefurbo Helsinkio, floras aceroj, ĉerizarboj donacitaj de Japanio. Oni tie eĉ festos Hanami. En la direkto sudo-nordo Finnlando mezuras pli ol mil kilometrojn. Nun en la nordo komenciĝos la blanka noktoj, kiam la suno ne subeniros la horizonton. En la suda parto la nokta malhelo daŭras 3-5 horojn.

Ĉiuprintempe okazas strikoj pri salajroj kaj laborkondiĉoj. Nun strikas ekzemple pilotoj de Finnair. La ĉiama timo etas pri militoj, tiu en Ukrainio kaj iu eble de Rusio al ni. Nia orienta limo estas fermita, kion ne ĉiuj akceptas. Oni malsamopinias pri la fermiteco, ĉar multaj havas familianojn, parencojn kaj aferojn en Rusio kaj kelkaj rusoj havas feriodomojn en Finnlando. Ankaŭ internacia justo ne akceptas la fermon de la limo. Krome,oni zorgas pri la prezoj en manĝaĵovendejoj, ĉu ili tro leviĝos aŭ ne.

**De Hori Jasuo**

Kara, dankon. C^u mi rajtas dissendi la raporton al la mondo?

La temo transiras de agrabla al malagarabla. Se ne estus militoj, c^iuj povus vivi felic^e. Kiam Zamenhofu estis juna, li demandis sin, kial homoj ripetas militojn? G^is kiam ni devas fari saman demandon. Homoj estas vere stultaj. Antau hierau ni havis packunvenon kaj en g^i prlegintino prezentis la vortojn de la prezidanto de Venezuela « Nur homoj el c^iuj bestoj ripete stumblas kontrau saman s^tonon. Por eviti tion, ni devas memori » Jasuo

**2025年5月5日 フィンランド**

フィンランドにゆっくりと春が来ています。ラップランド最北部にはまだ1メートル以上の雪が積もっている一方、南部の首都ヘルシンキ周辺では日本から寄贈されたカエデや桜が咲いている。そこでは花見も行われます。フィンランドは南北方向に1000キロメートル以上あります。今、北の地域では太陽が地平線の下に沈まない白夜が始まります。南部では夜の暗闇は3～5時間続きます。

毎年春になると、賃金や労働条件をめぐるストライキが発生します。たとえば、フィンランド航空のパイロットは現在ストライキ中です。

常に恐れられているのは戦争、ウクライナでの戦争、そしておそらくロシアから我々に対して起こる戦争です。私たちの東の国境は閉鎖されていますが、誰もがそれに賛成しているわけではありません。ロシアに家族や親戚、仕事場がある人が多く、フィンランドに別荘を持っているロシア人も多いため、閉鎖については意見が分かれています。国際司法も国境の閉鎖を認めません。さらに、人々は食料品店の価格が上がりすぎないかと懸念しています。 サリーコ

堀から。

ありがとう。話題は楽しいことから不快なことに移ります。戦争がなければ、誰もが幸せに暮らせるでしょう。ザメンホフは若い頃、なぜ人々は戦争を繰り返すのか自問しました。いまだに我々は同じ質問をしなければならないのだから、人間は本当に愚かだ。一昨日、私たちは平和集会を開き、その中で講演者がベネズエラ大統領（多分、先日亡くなった）の言葉を紹介しました。「あらゆる動物の中で、同じ石に何度もつまずくのは人間だけだ。これを避けるために、私たちは覚えておかなければなりません」 と。

**2025.5.7 DR Kongo**

Kara estimata,
Jen la teksto de la kanto <Patrino>:

Patrino
Vi sidas ĉe mia lito trankvile,
la nokto silentas, la koro batadas facile.
Via brakumo — varma, mola,
via ĉeesto — mia stelo sola.

Vi estas lumo de ĉiu tago,
vi estas stelo dum mia vojaĝo.
Danko pro via amo senlima,
patrino, vi estas koro sublima.

Via mano forpelas la timon,
via voĉo trankviligas la animon.
Vi parolas kun saĝo kaj feliĉo,
kaj kun vi foriras ĉiu doloriĝo.

Vi estas lumo de miaj tagoj,
vi estas gvido dum vivaj vojoj.
Danko pro via amo senlima,
patrino, vi estas koro sublima.

Dankon pro vivo kaj ĉiu momento,
ĉar via koro portas ĉielan senton.
Vi estas trezoro sen komparado,
mi kantas por vi kun tuta adorado.

Vi estas lumo de miaj tagoj,
vi estas gvido dum vivaj vojoj.
Danko pro via amo senlima,
patrino, vi estas koro sublima.

Vi donis flugilojn al miaj revoj,
fidele gardante min tra ĉiuj nevoj.
En viaj okuloj mi vidas la celon,
vi donas al vivo gvidantan stelon.

Kiam la vivo fariĝas malbona,
vi restas apude, mia patrino bona.
Vortoj ne sufiĉas por dank' esprimi,
via amo min ĉiam povas subteni.

Vi estas lumo de miaj tagoj,
vi estas gvido dum vivaj vojoj.
Danko pro via amo senlima,
patrino, vi estas koro sublima.

Kaj eĉ, se vortoj iam forbloviĝos,
via bildo en mia animo restiĝos.
Patrino, vi estas mia hejmo ĉiam,
en mia koro vi restas senlaca flamo.

Amike Honoré Sebuhoro

**2025 年 5 月 7 日 コンゴ民主共和国**
尊敬する皆様、
以下は「母」という曲の歌詞です。

母親
あなたは静かに私のベッドのそばに座り、
夜は静かで、
心臓は楽に鼓動します。
　あなたの抱擁は暖かく、柔らかく、
あなたの存在が私の唯一の星です。

あなたは毎日の光です。
あなたは私の旅の星です。
あなたの限りない愛に感謝します。
お母さん、あなたは崇高な心です。

あなたの手は恐怖を追い払い、
あなたの声は魂を癒してくれます。
あなたは知恵と幸福をもって語ります、
あなたと共にすべての痛みは消え去ります。

あなたは私の日々の光です。
あなたは人生の道を導く者です。
あなたの限りない愛に感謝します。
お母さん、あなたは崇高な心です。

人生と一瞬一瞬に感謝し、
あなたの心は天国のような気持ちを抱いているからです。
あなたは比類のない宝物です。
私は心からの崇拝を込めてあなたのために歌います。

あなたは私の日々の光です。
あなたは人生の道を導く者です。
あなたの限りない愛に感謝します。
お母さん、あなたは崇高な心です。

あなたは私の夢に翼を与えてくれました
あらゆる試練を通して私を忠実に守ってくれました。
あなたの目に目標が見える、
あなたは人生に導きの星を与えます。

人生が苦しくなると、
母さん、近くにいてくれます。
感謝の気持ちは言葉では言い表せません。
あなたの愛はいつも私を支えてくれます。

あなたは私の日々の光です。
あなたは人生の道を導く者です。
あなたの限りない愛に感謝します。

お母さん、あなたは崇高な心です。

たとえ言葉が消え去ったとしても
あなたの姿は私の心の中に残ります。
お母さん、あなたはいつも私の家です。
私の心の中で、あなたは消えることのない炎であり続けます。 親

オノレ・セブホロより

**2025.5.9 DR Kongo**
**NUNA PAPO AL LA TUTA MONDO.**

Kardinalo Robert Francis Prevost iĝis la nova papo la 8-an de majo 2025, iĝante la unua usonano estanta elektita estro de la Romkatolika Eklezio.
Originoj kaj trejnado:
Naskiĝis la 14-an de septembro 1955 en Ĉikago (Usono).
De franca, itala kaj hispana deveno.
Li aliĝis al la aŭgustenanoj (Ordo de Sankta Aŭgusteno) en 1977, faris siajn solenajn promesojn en 1981 kaj estis ordinita pastro en 1982.
Li havas diplomojn pri matematiko kaj filozofio (Villanova University), kaj pri teologio (Catholic Theological Union of Chicago). Li doktoriĝis pri kanona juro en Romo (Universitato de Sankta Tomaso de Akvino).
Misiisto en Peruo
Ekde 1985 li laboris kiel misiisto en Peruo, en la urbo Chulucanas.
Li okupis tie diversajn postenojn: trejnisto, preĝo, juĝa vikario ktp.
Li akiris peruan naciecon en 2015.
En 2014, li iĝis apostola administranto de la diocezo de Chiclayo, tiam episkopo en 2015.
Respondecoj en Romo:
De 2001 ĝis 2013, li estis Preĝinto Ĝenerala de la Aŭgustena Ordo en Romo.
En 2023, li estis nomumita Prefekto de la Dikasterio por Episkopoj kaj Prezidanto de la Pontifika Komisiono por Latin-Ameriko.
Li estis kreita kardinalo fare de papo Francisko en septembro 2023.
Elekto kiel papo:
Ĵaŭdon, la 8-an de majo 2025, li estis elektita papo dum la konklavo, sukcedante Franciskon.

Lia elekto reflektas lian proksimecon al la pastorecaj kaj misiaj orientiĝoj de Papo Francisko, same kiel lian internacian sperton.
DIO BENU NIAN PAPON !

**2025 年 5 月 9 日 コンゴ民主共和国**




全世界に向けた現在の教皇。

ロバート・フランシス・プレボスト枢機卿は 2025 年 5 月 8 日に新教皇となり、ローマカトリック教会の長に選出された初のアメリカ人となった。

起源と訓練:

1955 年 9 月 14 日、シカゴ（米国）生まれ。 フランス、イタリア、スペイン系。 彼は 1977 年に聖アウグスティノ修道会に入会し、1981 年に厳粛な誓いを立て、1982 年に司祭に叙階された。 彼は数学と哲学（ヴィラノバ大学)、および神学（シカゴ・カトリック神学連合）の学位を取得しています。彼はローマ（聖トマス・アクィナス大学）で教会法の博士号を取得しました。

ペルーの宣教師

彼は 1985 年以来、ペルーのチュルカナス市で宣教師として働いています。 そこで彼はコーチ、祈祷師、司法司祭など、さまざまな役職を務めました。 彼は 2015 年にペルー国籍を取得しました。 2014 年にチクラヨ教区の使徒座管理者となり、2015 年に司教となった。

ローマでの責任:

2001 年から 2013 年まで、ローマのアウグスティノ修道会の総長官を務めた。 2023 年、司教区長官およびラテンアメリカ教皇庁委員会委員長に任命された。 彼は 2023 年 9 月にフランシスコ教皇によって枢機卿に任命された。

教皇選出：

2025 年 5 月 8 日木曜日、彼はコンクラーベでフランシスコの後任として教皇に選出された。 彼の選択は、フランシスコ教皇の牧会と宣教の志向への近さと、彼の国際経験を反映している。

神は我々の教皇を祝福します！

Amike Honoré Sebuhoro

## 2025.5.12 DR Kongo

Bob Marley iam diris:
"Konservu tion, kion vi havas, forgesu tion, kio doloras vin, batalu por tio, kion vi volas, taksu tion, kion vi posedas, pardonu tiujn, kiuj vundas vin, kaj ĝuu tiujn, kiuj amas vin."

La vivo estas tro mallonga por plenigi ĝin per rankoroj. Pli bone plenigi ĝin per amo, ĉar finfine, tio estas la nura afero, kiu vere gravas. »
Ni deziras al vi daŭran sukceson en viaj sinceraj agoj kaj ankaŭ feliĉan ĉiutagan vivon!
Bonan komencan semajnon!
Sincere, Honoré Sebuhoro



ボブ・マーリーはかつてこう言いました。「持っているものを保ち、あなたを苦しめたもののことはは忘れ、欲しいもののために戦い、持っているものに感謝し、傷つけた人を許し、愛してくれる人を大切にしましょう。」恨みで満たすには人生は短すぎます。それを愛で満たす方が良いです。なぜなら、結局のところ、それが唯一本当に大切なことだからです。 » これからも誠実な行動で成功し、幸せな毎日を過ごされることを祈っています！良い週の始まりを！
敬具、オノレ・セブホロ

ロバート・ネスタ・マーリー（英語：Robert Nesta Marley OM、1945年2月6日 - 1981年5月11日）は、ジャマイカのシンガーソングライター、ミュージシャン。レゲエの先駆者の一人であり、スカの時代から活躍しロックステディ、レゲエの時代まで音楽界を駆け抜けた。また洗練された歌声と宗教的・社会的な歌詞、曲で知られた。マーリーは60年代から80年代初頭までレゲエ音楽とカウンターカルチャーの活躍により、ジャマイカ音楽の世界的な認知度を高めることに貢献した。マーリーはラスタファリの象徴、ジャマイカの文化とアイデンティティの世界的なシンボルともみなされた。マリファナ合法化支持者であり、汎アフリカ主義でもある。音楽ソフトの推定売上枚数は世界中で7,500万枚を超え、マーリーの音楽と思想は後進のミュージシャンなどに影響を与えた。

## 2025.5.13 Finnlando

La 11an de majo 2025 en Finnlando okazis Patrina tago. La Patrina tago ĉiam estas la dua dimanĉo de majo. La tradicio estas, ke la edzo kaj gefiloj en juna familio preparas por la patrino matenmanĝon kaj portas tion al ŝia lito, donacas rozojn aŭ ion alian, eble kantas, brakumas, dankas. Ili donas gratulkartojn, kiujn desegnis la infanoj , aŭ aĉetitajn kartojn. Dum la tago oni povas manĝi en restoracio, fari ekskursojn, telefonadi kaj sendi mesaĝojn unuj al la aliaj, se ne ĉiuj povas renkontiĝi en unu loko.

La vetero en majo ankoraŭ povas esti iom vintreca. Oni ne facile trovas florojn en la naturo, sed la migrobiroj revenas kaj ĉie kampare oni ilin aŭdas. En plej bona kazo en suda Finnlando floras blankaj anemonoj kaj ekverdiĝas betuloj, dum en Laponio neĝo ne jam degelis. Se la familio jam maljuniĝis, oni tamen provas renkonti la patrinon/avinon kaj same afable konduti al ŝi. Ĉiuj familioj havas siajn proprajn variantojn de la Patrina tago, kaj se la kalendara dato malkonvenas, ili aranĝas siajn festojn en aliaj proksimaj datoj.

En la fino de majo aŭ en la komenco de junio lernejoj fermiĝas kaj laj lernantoj liberiĝas por komenci siajn feriojn. Nun estas proponata, ke Finnlando sekvu la datojn de aliaj , pli sudaj eŭropaj landoj, kie la semestro daŭras ĝis julio. Tamen nia klimato estas alia kaj precipe multa lumo en junio ĝojigas ĉiujn. Esas malfacile teni la lernantojn en siaj lernoĉambroj , kiam venas la somero. Eĉ la noktoj povas esti preskaŭ lumaj. Post la frosta malhela vintro tio por ni estas granda beno.

saliko,

Finnlando, Saliko

### 2025 年 4 月 13 日 フィンランド

フィンランドでは、母の日は 2025 年 5 月 11 日に祝われました。母の日は常に 5 月の第 2 日曜日です。伝統では、若い家族の夫と子供たちは母親のために朝食を用意し、それを母親のベッドに持って行き、バラか何か他のものを贈り、歌を歌ったり、抱き合ったり、感謝の言葉を述べたりします。子どもたちが描いたり、購入したカードを配ります。日中は、全員が一か所に集まらない場合は、レストランで食事をしたり、遠出をしたり、電話をかけたり、お互いにメッセージを送ったりすることができます。

5 月の天気はまだ少し冬っぽいことがあります。自然の中で花を見つけるのは簡単ではありませんが、渡り鳥が戻ってきて、田舎のいたるところでその鳴き声を聞くことができます。フィンランド南部では、せいぜい白いアネモネが咲き、白樺の木が緑に染まる程度ですが、ラップランドではまだ雪が溶けていません。

家族がすでに高齢化している場合でも、母親や祖母と会って同じように親切に接するよう努めます。どの家庭も母の日を独自の形で祝っており、カレンダーの日付が都合が悪い場合は、近い他の日付で祝うように手配します。

5月末または6月初めに学校が休校となり、学生たちは休暇に入ります。現在、フィンランドは、学期が7月まで続く他の南欧諸国に倣って、学期の日程を変更することが提案されています。しかし、私たちの気候は異なり、特に6月の豊富な光は誰もが幸せになります。夏になると、生徒たちを教室に留めておくのは難しくなります。夜でもほとんど明るくなります。凍りつくような暗い冬が過ぎ去った後、これは私たちにとって大きな恵みです。 フィンランド，サリーコ

## 2025.5.18 Japanio

La 20-an de aprilo, mi vizitis la Arkeologian Muzeon de la urbo Hokuto en la gubernio Jamanaŝi. La muzeo ekspozicias multajn ceramikaĵojn kaj argilajn statuetojn el la Ĵoomon-periodo, kiuj estis elfositaj en tiu regiono. Min kortuŝis la beleco de la argilaj statuetoj.

La Ĵoomon-periodo rilatas al la kulturo de homoj, kiuj vivis 2500 - 10 000 jarojn antaŭe. La vorto "Ĵoomon" signifas ŝnurdesegnadon sur argilaĵoj. Mi tre interesiĝis pri la argilaj statuetoj. La pupo havas vizaĝon iom fremdan. Kiam mi rigardas ilin, mi estas allogita. Do, mi aldonas la fotojn, kiujn mi prenis, kaj mian desegnon. HORI Jasuo

### 2025年5月18日 日本

4月20日、山梨県北杜市考古資料館を訪問しました。資料館にはこの地域で発掘された縄文時代の土器や土偶が数多く展示されています。土偶の美しさに感動しました。 縄文時代は2,500～10,000年前に生きていた人々の文化を指します。 「縄文」とは土器の表面に紐で描いた絵から付けられた名前です。私は土偶にとても興味がありました。その人形はどこか異星人のような顔をしています。撮った写真と描いた絵を載せておきます。堀泰雄







大型塔状把手付土器
大型塔状把手付土器
塔状把手付土器
山崎第4遺跡
蛇文把手付土器

**2025.5.25 Ĉeĥio**

Saluton sinjoro Jasuo.

En tuta Europo oni memorigis finon de dua Mond Milito. Sed fino de rusa milito en Ukrajino ankorau ne videblas.

Rusaj milit'dronoj kaj raketoj ĉiutage atakas ukrainajn urbojn proksimume 150 dá milit'dronoj kaj 75 raketoj. Teruraj detruoj de civila infrastrukturo. En urbo Sumy rusa raketo forbruligis buson de urba trafiko kun homoj en g^i.

En Slovakio miloj da homoj venis al tombo de generalo Štefánik (nacia heroo). Sed samrempe čefministro FICO venas al Moskvo fari hontaj^on al Slovakio. Slovakoj diras : se la generalo povus vidí kion faras FICO, turnos en sia tombo kiel helico. Se posteuloj ne kondutas sin dece, prauloj ne havas trankvilon en siaj tomboj.

Ukraina Energia kompanio DTEK akuzis rusojn če internacia tribunalo pro anekso de propraj^o de la kompanio en okupita Krimeo. Kaj lau ekzekucio ili povas forpreni rusan propraj^on ekzemple en Čehio au alia europa lando.

Pasinta semajne okazis interšango de milit'kaptitojn 270 armeanojn kaj 120 civil'ulojn, kiuj rusoj prizonigis en okupitaj teritorioj. Al Kyjiv atakis 14 dá raketoj kaj 250 da milit'dronojn. Multnombraj grandaj incendioj en kelkaj lokoj.

Hierau estis interšang^itaj ankorau 300 milit'kaptitoj. Lau interkonsento en Istanbulo oni devas interšang^i mil personojn.

Finlando malpermesas al rusoj kaj belarusoj ačeti nemoveblaj^ojn (domojn, log^ejojn, k.t.p.) en Finlando.

Ambasadoro de EU en Ukrajino Katarína Maternova rekomenidis al tiuj, kiuj ankorau ne komprenis, ke rusoj ne havas pacajn intencojn, legi j^urnalojn.

Sinjoro TRUMP malpermesas al plej granda usona universitato havi eksterlandajn studentojn malgrau ke nun ili estas kvarono de tuta kvanto.

EU volas fari samé altajn reciprokajn impostojn pór usonaj varoj.

Germanaj armeanoj venis al Pollando pór plifortigi limgardojn če rusa limo.

Norda Koreo sendas al RF ankorau 10000 dá armeanojn, estroj eč ne informas homojn, kien ilin sendadas, kaj neniu demandas ilin pri konsento.

En Rumanio kaj Pollando okazis balotojn. Aspektas ke sukcese, nov'elektitaj kandidatoj konservas europan orientig^on. Olga

**2025 年 5 月 25 日 チェコ共和国**

こんにちは、ヤスオさん。 ヨーロッパ全土で第二次世界大戦の終結が記念された。しかし、ロシアのウクライナ戦争の終結はまだ見えません。

ロシア軍の無人機とミサイルは毎日ウクライナの都市を攻撃しており、その数はおよそ 150 機の軍用無人機と 75 発のミサイルに上ります。民間インフラのひどい破壊。スムイ市では、ロシアのミサイルが乗客を乗せた市営バスを焼き払った。

スロバキアでは、何千人もの人々がシュテファーニク将軍（国民的英雄）の墓に参拝しました。しかし同時に、フィツォ首相はスロバキアを辱めるためにモスクワにやって来た。スロバキア人はこう言う。「もし将軍が FICO のやっていることを知ったら、墓の中でプロペラのように回転するだろう。」子孫が行儀よくしないと、先祖は墓の中で安らぎを得られません。

ウクライナのエネルギー企業 DTEK は、被占領下のクリミア半島にある同社の資産をロシアが併合したとして国際裁判所でロシアを非難した。そして、執行次第では、例えばチェコ共和国や他のヨーロッパの国にあるロシアの財産を没収することもできるとしている。

先週、ロシア占領地で捕虜にされていた軍人 270 人と民間人 120 人の捕虜の交換が行われた。キエフは 14 発のロケット弾と 250 機の軍用ドローンによる攻撃を受けた。複数の場所で多数の大規模な火災が発生。昨日、さらに 300 人の捕虜が交換された。イスタンブールでの合意によれば、1000 人の交換が必要となる。

フィンランドはロシア人とベラルーシ人がフィンランド国内の不動産（住宅、アパートなど）を購入することを禁止しています。

ウクライナ駐在 EU 大使カタリナ・マテルノヴァ氏は、ロシア人に平和的意図がないことをまだ理解していない人々に新聞を読むよう勧めた。

トランプ氏は、現在留学生が全体の 4 分の 1 を占めているにもかかわらず、アメリカの主要大学が留学生を受け入れることを禁止している。

EU はアメリカ製品に同様に高い相互関税を課したいと考えている。

ドイツ兵はロシア国境の国境警備隊を強化するためにポーランドに来た。

北朝鮮は今もなおロシア連邦に 1 万人の軍人を派遣しているが、指導者たちは派遣先を国民に知らせず、誰も同意を求めていない。

ルーマニアとポーランドで選挙が行われた。新しく選出された候補者たちは、欧州志向をうまく維持しているようだ。オルガ

**Finnlando**

Nun, fine de majo, estas la plej luma sezono. En Laponio la suno ne subeniras, en suda Finnlando la malluma nokto daŭras eble 7 horojn. La naturo kvazaŭ vekiĝas post la vintrodormo. Ekfloras ornamaj pomarboj, fruktodonaj pomarboj, riboj, kaj floras la ĉerizaboj donacitaj de japanaj gemikoj en Helsinki. Floras sovaĝaj violoj. Blankfloraj au rozkoloraj ornam-arbustoj floras en ĝardenoj, parkoj. La plej ofta tamen en la gazonoj estas la flava taraksako, kiu estas konsiderata fiherbo. Multaj homoj elsarkas ĝin. Kreskas novaj freŝaj urtikoj, kiujn kelkaj homoj uzas por supo, sekigas por venontvintra uzo. Tulipoj kaj narcisoj jam velkas. Baldaŭ floros siringoj. Ili plenigos la aeron per sia bonodoro.

Ĉiuj birdoj konstruis siajn nestojn. Eble ili nun kovas siajn ovojn . Ili plenigas la aeron per sia kantado. Homoj retrovis siajn somerajn vestojn: ŝortojn, sandalojn, T-ĉemizojn. Ii formetis subĉemizojn kaj longajn kalsonojn. La noktoj tamen povas esti malvarmaj

kaj oni ne kuraĝas planti sentivajn florojn ekstere antaŭ ol en la 10a de junio, post kiu kutime ne okazas frosto nokte.

Estas la sezono de enamiĝoj. En suda Finnlando loĝas 188 homoj en kvadrata kilometro, en norda Finnlando 1,9 homoj en kvadrata km. Tial la naturo havas grandan rolon ĉie. Ni havas 28 000 lagojn pli grandajn ol duona hektaro. Ili ĉiuj liberiĝis de sia glacia kovrilo, same niaj riveroj. Kiam rivero liberiĝas de la glacio, ĝi povas ĵeti grandajn pecojn de glacio apuden sur la bordojn. Tial oni atentas kaj ne konstruas domon tro proksime al tia rivero.

En lernejoj la lernantoj senpacience atendas siajn feriojn, kiu komenciĝas en junio. La tutan longan kaj malluman vintron ili sidis en siaj lernoĉambroj. Nun ili sopiras liberon .

Saliko, Finnlando

フィンランド

5 月の終わりの今が一番明るい季節です。ラップランドでは太陽が沈むことはありませんが、フィンランド南部では暗い夜が 7 時間ほど続きます。自然は冬眠から目覚めつつあるようだ。観賞用のリンゴの木、実のなるリンゴの木、スグリが咲き、ヘルシンキの日本人庭師から寄贈された桜の木も咲いています。野生のスミレが咲いています。白い花やピンクの花が咲く観賞用の低木が庭園や公園に咲きます。しかし、芝生に最もよく見られるのは、雑草とみなされる黄色いオナガザルです。多くの人がそれを排除しています。新しい新鮮なイラクサが育っており、それをスープに使ったり、乾燥させて次の冬に使う人もいます。 チューリップや水仙はすでに枯れ始めています。もうすぐライラックが咲くでしょう。彼らの香りが空気中に充満されるでしょう。 鳥たちはみんな巣を作りました。たぶん、今は卵を温めているのでしょう。彼らは歌声で空気を満たします。

人々は夏が来るということでショートパンツ、サンダル、T シャツを取り出し、アンダーシャツと長ズボンをしまいました。しかし、夜は寒くなることがあり、6 月 10 日までは繊細な花を屋外に植えることはしません。それ以降は通常、夜間に霜が降りることはありません。

ロマンスの季節です。フィンランド南部では 1 平方キロメートルあたり 188 人、フィンランド北部では 1 平方キロメートルあたり 1.9 人です。だからこそ、自然はあらゆるところで大きな役割を果たしているのです。半ヘクタール以上の面積を持つ湖が 28,000 あります。それらはすべて、私たちの川と同じように、氷の覆いから解き放たれました。川の氷が解けると、大きな氷の塊が川岸に打ち上げられることがあります。だからこそ、人々は注意して、そのような川の近くに家を建てないようにするのです。 学校では、学生たちが 6 月に始まる休暇を待ちわびている。彼らは長く暗い冬の間ずっと教室に座っていました。今、彼らは自由を切望しています。サリー子